GEA-amoj,

POA.

Saluton!

GISTO, Verda Kafo - OKT-2001
G.O.VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 S.S. do Kaí-RS

Senpage disdonata legaĵo
Lunĉejo Tutty's – POA

GRATULON !

Varmkoran saluton ni adresu al GEA-estraro, pro la tondra sukceso sukcesinta en la distrumpetado de nia nobla idealo al vasta TV-spektantaro en pasinta semajno !! Tutcerte la ago estigos intereson en multaj spektintoj kaj lernantoj en venontaj E-kursoj kaj ke baldaŭ elbakiĝos parolkapablaj gesamideanoj (ne dumvivaj balbutantoj). Al mi mem mankis ŝanco vidi la TV-kanalon en la ĝusta horo tamen mi sciiĝis pere de geamikoj, ke okazis lerta prezentado de la gaŭĉa E-movado far la estraro de GEA. Ero bedarinda estas, ke oni montris la revuon EPĈ, kiu jam de preskaŭ tuta jaro pereis. Jes, vere, ĝi estis konkreta kaj laŭdinda propagandilo, inda esti montrata al nekredemaj homoj ke nia afero prosperas, ke ni emas konvinki la mondon ke neniu bezonas pruntepreni alies lingvon por interparoli kun fremduloj. Nun EPĈ daŭras viva sed nur en la TTT. Ĝia adreso: WWW. CRI. Com. CN sed relative tro malmultaj homoj kapablas posedi komputilon – EPĈ mortis ĉefe pro manko de sufiĉe granda abonantaro Laŭ mi, ĉiu neaboninto iom kulpas pro la malapero de tiu lukse presita propagandilo kiun oni povis alsendi al homoj iomete interesataj pri la genia lingvo neŭtrala.

ĈU 3ª MONDMILITO ?

Ne vane la homaro sin demandas, kio okazos dum la lomga milito anoncita de Usono? Mi mem kredis je rapida venko, pro la monstra potenco kontraŭ malgranda armeo afganistana. Dum la tempopaso oni ekdubas ĉu Usono baldaŭ ekstermos siajn malamikojn des pli ĉar la bombardata lando ne montras signon ke ĝi emas kapitulaci. Kontraŭe, ĝi diskonigas defiajn anoncojn spite al la agreso suferata. Tiu fakto iel timigas gepatrojn de junuloj militaĝaj ĉar en tiu regiono pluraj landoj regas la atomenergion. Se unu el ili nur karesos la ellasilon aliu zorgos esti la unua kiu trafos la minacanton. Post tio nur Dio scias kio okazos. Nun oni observas agojn de la tiel nomita Sankta Milito. Ĉiu divenas ke la disvastigado de atakoj per antrakso estas ero el ĝi. Montriĝas ke antrakso estas vere timinda se oni suferas pulman infektiĝon. Sed, neniu antaŭscias kio venos poste...

La sperto instruas ke, je daŭraj maljustaĵoj, sen espero pri justa solvo, turmentata homo atingas la vojkruciĝon "mortigi antaŭ ol morti", des pli rapide ĉe fanatikismo. Laŭ mia vidpunkto, nialanda eduksistemo "ne kontraŭi infanon" tre kulpas pri la nuntempa malordo. Plenkreska la individuo daŭras obstina, eĉ pli obstina kaj, se iu kontraŝtaras lin, estiĝas motivo solvenda per pafilo aŭ sabro.

Pardonpete mia fingro montras al bonstataj familioj, en kiuj plenkreskas 95% de tiaj sendisciplinaj homoj. Mia pravigo: la patron regas la devo prizorgi la

hejmon per ĉiuj necesaĵoj. "Ne" restas tempo por priatenti siajn etulojn, kiam li vespere revenas hejme. Bonstata panjo, por ne devigi sin elteni ribelemajn infanojn, ie alprenas edifajn sociajn kompromisojn. Ambaŭ vivas nekulpokonsciaj. Ili pagas servistinon kiu devas ruze elturniĝi kiam okazas kontraŭstaroj far la "sanktaj anĝeloj". La gepatroj forgesas ke servistino okupas nivelon de helpantino tial ke ŝi ne havis ŝancon studi kaj atingi pli altan rangon en la vivo. Manke de klereco kaj manke de aŭtoritateco, kiam la infanoj insatalis ĥaŭson, ŝi ne rajtas rebonordigi la etoson per la bona miljara rimedo, paron da pantoflobatoj sur la pugo, kiel decas, por enkonduki dumvivan bonkonduton kaj disciplinon. La neglektaj gepatroj preterpensas ke ribelajn homojn la polico poste korektos, sed ne per karesoj sed jes, per rimedoj abomenindaj, kaŝe !!

ORELTIRETO

Ne plaĉas al mi sed, antaŭvespere de la 87ª UKE, ĉifoje en Brazilo, mi ne sukcesas bremsi mian emon tiri la orelojn, ambaŭ, de niaj dumvivaj balbutantoj. Bildigu al vi: se iu ajn neklera homo kapablas ellerni la E-gramatikon ene de ne pli ol unu semajno, se de tio dependus perdi aŭ ne sian kapon, kial vi ne serioze koleras kontraŭ vi mem kaj finlernas ĝin trankvile en unu monato ?? – Jen taŭga recepto: en la unua semajno parkerigu la finaĵojn de substantivoj kaj adjektivoj (O,A,OJ,AJ) plus finaĵojn de la verboj (I,AS,IS,OS,US,U) plus la personajn pronomojn. – Dua semajno, Ĝisfunde parkerigu la korelativajn vortojn – Tria semajno, enkapigu la prepoziciojn, numeralojn kaj adverbojn. – En la kvara semajno restas praktiki atenton pri verboj, ĉu transitivaj aŭ ne. Tio gravas, por ne forgesi aldoni la akuzativan-N. Aldone vi devas senpigre legi...legi, skribi, leteri kaj paroli...babili. Se mankas kompano por tio, aŭskulto Esperanton en radio. Preskaŭ senpene vi multobligas vian enkapan vortaron. En la UKE-urbo Fortaleza vi ne perdos eĉ komon dum varieteo, teatraĵo, ŝercoj kaj seriozaj paroladoj. de tie vi reflugos al via hejmloko plena de ĝojo, danke al la fakto ke vi konstatas ke vi venkis vin mem. Laŭdire tiu estas la plej dura batalo en la vivo nepre venkenda, se oni volas vivi plenfeliĉa. Komencu tuj...prefere komencu hieraŭ !!

AL GEFUMANTOJ k TIES FAMILIANOJ

Ĉirkaŭ unu triono de la sudamerikanoj fumas. Nur en Brazilo oni kalkulas 50 milionojn da senprudentaj fumantoj. Je averaĝe 20 cigaredojn tage, rezultas la nombro de unu miliardo da cigaredoj konsumitaj far homoj kiuj malrespektas alies rajton spiri puran aeron. Pro tio ilin atendas natura punpago kiun oni ne deziras al sia plej ofendema malamiko: lante...tre lante morti (dum pluraj semajnoj) manke de oksigeno, pro sufokiĝo, same kiel se la kulpulo ne plu havus pulmojn. Li tagnokte baraktadas kaj vane petegos helpon sed neniu kuracisto kapablas savi lin/ŝin el tia infero. Vi, kompatema fumanto, pensu serioze pri via sama "senfina" suferega morto. MEMORINDAS: La preso sciigas ke ĉiujare mortas 4 milionoj da tiuj suferantoj, pro fumado. Pulma kancero mortigos pli ol 10.000 virojn plus 5000 virinajn brazilanojn. Laŭ statistiko la virinaj kazoj kreskis je 108%. – Vere pensiga! Tabakfumado kulpas pri 90% de pulma kancero; 80%,enfizemo;25%, infarkto kaj 40%, bronkito kaj enkapa sangoelverŝo.

ALDONAĴO – Portugaligi:

A verdade verdadeira seja dita
Te ultrapassarei sem esforço demaziado.